

Tago de Esperanto-libro en Gdańsk (Pollando)



EX LIBRIS

ESPERANTO

**Oddział Gdański
Polskiego Związku Esperantystów**

**Pedagogiczna Biblioteka Wojewódzka
w Gdańsku**

Ludwik Zamenhof
(1859 – 1917)

zapraszają na spotkanie z okazji
Dnia Książki Esperanckiej

Tago de Esperanto-libro

Spotkanie odbędzie się **12 grudnia 2012 r.**
o godz. **11.30** w sali **318,**
al. gen. **J. Hallera 14** w Gdańsku

W programie:

1. Prezentacja w języku esperanto „Boże Narodzenie w baśniach Andersena” - Małgorzata Zięba-Szmaglińska oraz uczniowie Szkoły Podstawowej nr 50 im. Emilii Plater w Gdańsku
2. Historia i tożsamość Pedagogicznej Biblioteki Wojewódzkiej im. Gdańskiej Macierzy Szkolnej w Gdańsku – Maria Golly-Nowak, Wydział Zbiorów Specjalnych PBW w Gdańsku
3. Podziękowanie i gratulacje dla Pani Danieli Emler za 55 letnią aktywność w ruchu esperanckim na Wybrzeżu

JEDNOSTKA SAMORZĄDU
WOJEWÓDZTWA POMORSKIEGO

La 12-an de decembro 2012 - tri tagojn antaŭ la Zamenhofa tago - en Vojevodio Pedagogia Biblioteko en Gdańsk (Pollando) okazis solenaĵo **Tago de Esperanto-libro**. Jam la sekvan fojon Vojevodio Filio de Pola Esperanto-Asocio, Elementa Lernejo n-ro 50 kaj Vojevodio Pedagogia Biblioteko en Gdańsk kune organizis la feston, preparante kelkajn prezentadojn, prelegojn kaj ekspoziciojn. Parto de la programo okazis en Esperanto, aliaj programeroj estis prezentataj en la pola lingvo.



La programon en Esperanto preparis Małgorzata Zięba-Szmaglińska kun siaj gelernantoj, 11-jaraj infanoj (5-klasanoj), kiuj fervore lernas kantojn en diversaj lingvoj. La temo estis „**Kristnasko en la fabeloj de Hans Christian Andersen**”. Ili prezentis la vivon (precipe la infanaĝon kaj la studjarojn) de la fama dana verkisto kaj liajn du fabelojn „Abio” kaj „Knabineto kun alumetoj” en la traduko de Ludoviko Zamenhof. Dum la prezentado la infanoj kantis kvar kristnaskajn kantojn en la lingvoj: rusa, hungara, germana kaj pola, ĉiam kun la esperanta traduko.* La preparado daŭris longe, ĉar oni ne nur parolis kaj kantis, la infanoj ankaŭ ludis diversajn muzikinstrumentojn.



Tuj poste profesoro Wojciech Żelaniec, estro de Katedro de Etiko kaj Socia Filozofio en Instituto de Filozofio, Sociologio kaj Ĵurnalismo de Gdanska Universitato, prelegis en la pola lingvo pri Kopenhago kaj danaj kutimoj. La prelego de sinjoro Żelaniec bonege kompletigis la prezentadon de la lernejoj kaj ilia instruistino.



Aliaj programeroj estis: dankesperimo al sinjorino Daniela Emler por la 55-jara aktivado en la Triurba Esperanto-movado kaj prelego de Maria Golly-Nowak, kunlaborantino de Fako pri Specialaj Kolektoj de VPB, titolita „La historio kaj identeco de la Vojevodio Pedagogia Biblioteko en Gdańsk”.

La biblioteka salono estis ornamita per tri ekspozicioj: ekspozicio de desegnaĵoj de 3-klasanoj el Elementa Lernejo n-ro 50 pri la fabelo de H. C. Andersen „Knabino kun alumetoj”, ekspozicio de Esperantaj ekslibrisoj kaj ekspozicio de Esperantaj libroj el la kolekto de VPB en Gdańsk, kiu estas unu el la plej grandaj Esperantaj kolektoj en Norda Pollando.



Elementa Lernejo n-ro 50 kaj la gelernantoj de Małgorzata Zięba-Szmaglińska partoprenas la Zamenhofan feston jam de la jaro 2008. Ĝis nun ŝi kaj ŝiaj gelernantoj kontribuis al la solenaĵo per jenaj programeroj en Esperanto: teatraĵo pri Ruĝa Ĉapeto (2008), prezentado „Pola poezio en Esperanto” (2009), vort-muzika programo pri Fryderyk Chopin (2010) kaj pri Ferenc Liszt (2011) - du lastaj temoj estis prezentataj parte en Esperanto kaj parte en la pola lingvo (Chopin) - parte en la lingvoj pola, hungara kaj germana (Liszt).

*La kantojn vi povas trovi ĉi tie: <http://www.edukado.net/komunumo/forumo?k=23>

Raportis: **Małgorzata Zięba-Szmaglińska** gosia.fringilla@gmail.com